

Flore kuku !

Ĉokoladaj keksoj

Preparado: 30 min;

Kuirado: 10- 12 min

Por ĉirkaŭ 30 keksoj:

300 g da rufa sukero
200 g da mola butero
400 g da faruno
2 ovoj
300 g da ĉokolado en pecetoj

aldonu la sukeron. Aldonu la ovojn kaj bone miksu, poste la farunon kaj laste la ĉokoladon.

Per kafkularo (aŭ mane, laŭplaĉe), knedu etajn keksojn. Lasu ilin en la forno de 10 ĝis 12 minutojn.

Ankaŭ bongustaj kiam varmaj!

Ŝaltu la fornon je 200 °C.

Miksu unue la buteron kaj

Flora Markov



konkurso

Nova emblemo por SAT-amikaro

H1



H2



H3



D3



Jen la plej laste ricevataj kontribuoj.

Kongresanaro:

Hieraŭ (la 23an de februaro - NDRL), ni atingis 145 kongresanojn⁽¹⁾ kaj 24 partoprenantojn (por nur kanti, teatraĵi aŭ prelegi).

En la aliĝilo, ni aldonis gravan demandon: «ĉu vi partoprenas unuan fojon en SAT-Amikara kongreso?»

Mi konstatas ke:

37 kongresanoj (25% de la kongresanaro) kaj 11 intervenantoj deklaris ke ili venos unuan fojon en nian asocian kongreson. Tute ne malmulte?

Plie, pli ol 53 kongresanoj (37% de la

Kongreso

kongresanaro) ne estas membroj de SAT-Amikaro.

Inter la 56 korusanoj (Interkant'), 45 kongresos (31% de la kongresanaro)! Vidu la kulturan gravecon.

Programo

Ĝi aperis en La Sago 60 (dec 2010, speciala prikongresa numero) en provizora formo. Jen la plej gravaj ŝanĝoj:

(Se vi disponas retaliron vizitu nian retejon: kongreso2010.satamikaro.org)

Sabate:

La ekzamenoj daŭros ĝis la 18a (por la 2a grado)

Pro abundo da aliĝintoj, dua vizito al brikejo okazos je la 16a, dosamtempe kiel vizito de mitulbredado

Lunde:

de la 17a30 ĝis la 18a: nova konferenco/debato kun Daniel Durand pri «Agada solidareco kontraŭ malsato»

dimanĉe matene:

* Je la 9a30 : Unua laborkunsido

* 10a45 : Renkonto kun Dominique

Gautier, reĝisoro de la verkata dokumentfilmo pri esperanto.

* Je la 12a15 : Grup-fotado

* Je la 12a30 : Tagmanĝo

dimanĉe posttagmeze:

* de la 14a ĝis la 17a : SAT-Amikaraj laborgrupoj:

14a-15a30

Kiuj regionaj agadoj kaj en kiu medio por atingi celojn de nia asocio?

Revuo La SAGO (rubrikoj, kontribuantoj, SAT-varba efiko...)

15a30-17a

Rilatado kun frataj asocioj k movadoj neesperantaj

Rilatado kun kutlurcentroj en Franclingvio.

la OKK

APARTA MONERO !

Nia ĉarma bretona koboldo ankoraŭ ĵetis sian sorĉon sur nia SAT-amikara kongreso !

Ĉu vi vizitis vian bankon por depreni viajn koboldojn kontraŭ eŭroj?

Sciu ke aprile - tuj post la unua - vi uzostian kongresan moneron en Hiliono ...



(1) Plej freŝa nombro:

unu monaton antaŭ la kongreso, nome la 2an de marto,

alligis jam 162 kongresanoj !

(Liston videblan ĉe <http://www.esperanto-sat.info/article1618.html>)

SAT-amikaro

Agadraporto 2009

Grava notindaĵo el tiu agadjaro estas la reorganizado de la sideja laboro sekve de emeritiĝo de Kreŝo (marto 2009), kio postulis ŝovon de pli da taskoj de la SAT-sidejo al la SAT-Amikara. Tio okazis sufiĉe glate k ne tro problemige (vd Libroservon), ĉar kadre de intima kunlaboro inter al koncernaj aktivuloj (SAT- k SAT-amikaraj). Substrekinda ankaŭ estas la granda sukceso de la Paŭa kongreso, streĉe organizita en malmulta tempo, k kiu aparte plaĉis k trafis interalie pro la klopodoj esti malferma kultura evento videbla por la ekstera publiko, kun ambicia spektaklo-programo. Plej entuziasmiga afero el tiu kongreso estis la prezento k aprobo de propono finance subteni k engaĝiĝi en la projekto pri dokument-filmo en esperanto.

Membraro

La asocio enkalkulis 685 membrojn en 2009 (688 en 2008). La alveno de novuloj ĉi jare ankaŭ ebligis konservi stabilan membronombron malgraŭ la forpasoj de multjaraj anoj.

Komitato

Ĝi kunvenis dufoje ĉiumonate. Krom la sideja administrado k ĝenerala funkciigo (deĵorado, kursoj, ktp), ĝi pro ofta kunvenado povis prizorgi la traktendaĵojn sufiĉe akurate laŭlonge de la jaro. Gravaj noti, ke ambaŭ komitatoj de UFE (Espéranto-France) k SAT-Amikaro kunvenis en novembro por organizi interesaciajn kunagadojn pri pluraj aferoj, ĉefe por la komuna renkontiĝo organizota en Seto (Sète) paske 2011 k por projekto de naciskala petskribo favora al enmeto de

esperanto inter la libervolaj kromfakoj ĉe la bakalaŭreco.

Libroservo

Plu zorgata de Veroniko Ĵirar' (Girard) kun helpo de Fil' Giĉeto (Guichet) k okaze de Terez' Pinet' k Maksimiliano Gverino (Guérin), ĝi en 2009 funkciis tre tempovore pro tio, ke la respondeculoj apud la SAT-Amikara laboro devis transpreni laboron pri tiu de SAT k ĉefe de la eldonkooperativo (SAT-EFK), kiu postulis grandan fortostreĉon por taŭga reorganizo. Nun tio estas survoje al pli tempoŝpara administrado.

Por la kongreso en Paŭo estis eldonitaj du libroj: Kiel traduki..., kompilo el la konstanta rubriko de La Sago, 300-ekzemplere, k Jules Verne espérantiste!, dulingva eseo kies 200 ekzempleroj forvendiĝis antaŭ la jarfino k kiu do estis reeldonita januare 2010 en korektita k ĝisdatigita versio.

Lokaj perantoj

Reto de lokaj perantoj iom post iom teksiĝas k ekefikas, sed plu restas multo fareda tiurilate por komplete kontentige labori per ĝi.

La Sago

En 2009 la aperritmo estis rigore respektita, kuraĝige k bonvene estas konstati, ke kontribuoj pli abundas. Pri la franclingva suplemento, ĝi estis plenigita ĉefe el gazetartikoloj kolektitaj rete de malmultaj kontribuantoj, k por ĝi plu mankas ĉefredaktanto (k eĉ enpaĝiganto, ideale). Notindas, ke la skipo, relative malmulta nun entute, elspezas multan energion pri

klasikan gitaron kaj Giljomo kantos akompanate per piano» La maretanoj el Vannes atendas nin en sia «atendejo» la etoso estos gaja.... k.t.p.

Ĉu vi bone komprenis la mesaĝon? Ĉu vi estas konvinkita pri la graveco partopreni la liberigon de esperanta energio en Hiliono de la 3-a ĝis la 5-a de aprilo? Nu nur restas aliĝi se vi ne jam faris tion (restas ankoraŭ libera loĝejo en la amasloĝejo), prepari viajn valizojn kaj bonhumoron.

La O.K.K.-Skipo deziras al vi bonan vojaĝon kaj ĝojos akcepti vin je la 3-a de aprilo.

Ĝis tre baldaŭ.

Laurent Peuch

Enhavo

- 1 Kovrilpaĝo La filmo «Espéranto»
 - 2 Flore kuiru! SAT-Amikaro-emblemo Kongreso Lastaj informoj
 - 3-4 Agadraporto
 - 4 Kasraporto
 - 5 Referendumo
 - 5-6 Selle-humuraĵoj
 - 6 Libro vivas pli ol ...: Paĉjo, kio estas rasismo? Nacia identeco?
- Supplément en français**
- 7 Le film «Espéranto»
 - 8-9 Ça et là...
 - 10 Pour atteindre le Congrès
- 11 Utilaj informoj
 - Kiel traduki: Fin (2a parto)
 - 12 Libro-Servo
 - 13 Statistiko pri senlaboreco kaj dungiteco (2a parto)
 - 14 La Ĝenerala Kanto
 - 15 Esperantistoj aktivas
 - 16 Butikumu! BildDeliraĵo: Ĉe la lago 63

la revuo, k do gravas antaŭvidi solvojn malpezigi la laborŝarĝojn (aparte por la enpaĝiganto). Aperigo de speciala numero entute dediĉita al la kongreso ĉ. novembro/decembro montriĝas tre oportuna k daŭriginda kutimo.

Perkorespondaj kursoj

Deko da lernantoj estas instruataj de Klaŭdo Ĝerlato (Gerlat).

Bipo!

Bipo! Bipo! [Ĉu estas nova vorto?] La armorbordaj esperantistoj parolas al la francparolantaj esperantistoj de la tuta mondo.

Bipo! Bipo! Bipo! «La bretonaj dancoj estas facile danceblaj» «Louis Guilloux estas san-briega verkisto malkovrinda» «La verdaj ulvoj vidas ruĝe en la kongreso de SAT-Amikaro en Hiliono»

Bipo! Bipo! Bipo! «La bretonaj ekonutraĵoj kaj cidro estos ŝatataj» «La abeloj estas en danĝero» «La debatoj estos intereseĝaj»

Bipo! Bipo! Bipo! «La Ĝenerala Kanto plezurigos viajn orelojn» «Lino ludos

Partoprenis en ĉi numero:

(laŭ alfabeto ordo)

Andreo	Andrio
Jacques	Caubel
Véronique	Girard
Bruno	Henry
Ĵak	Le Puil
Franjo	Leveque
Flora	Markov
Vito	Markovo
Guy	Martin
Laurent	Peuch
André	Sadier
Frédéric	Scibor
Jean	Selle
Serĝo	Sir'
Juliette	Ternant
Gaby	Tréanton

SAT-amikaro Agadraporto 2009 plu

Retejo

Pri ĝi estis granda klopodo dum ĉi jaro por teni ĝin konstante ĝisdatigita, kun apero de novaj artikoloj plurfoje ĉiusemajne, unuflanke por informi pri okazontaj eventoj k regule okazantaj kursoj, aliflanke por kiel eble plej sisteme kolekti gazetartikolojn koncernantajn esperanton. Projekto reorganizi ĝian strukturon plu estas planata k jam parte farata, k ĉar funkcia per kunlabora programo, ĝi ricevu helpon de kiom eble multaj membroj por konstanta plibonigo. Ĝi ja estas plej vizitata montrofenestro de la asocio (paralele al la fizika sidejo).

Radio Esperanto (89.4 FM)

En Parizo, Gi' Kavaliero (Cavalier) ĉiusemajne vivigas duhoran elsendon dulingve, kiun eblas aŭskulti ankaŭ rete dum tuta semajno (vidu la tiuteman rubrikon de nia retejo).

Helpado al Afrikanoj

Resuma raporto de Ĵan-Ivo Santero (Santerre): De la 1/02/2009 ĝis la 30/01/2010, naŭ pakaĵoj estis senditaj al afrikaj grupoj aŭ individuoj, por pezo de 24,17 kg kun elspezo de 76,06 €.

Konklude

Ne mankas kunlaboraj projektoj k plibonigindaj aspektoj en la asocia vivo, k ne estas dubo, ke 2010 postulos same vigan agadon. Do ĉiu metu la manon al la pasto, k ni kune knedu indan asocion!

La komitato

Kasraporto 2009

Dum tiu jaro, la ĝenerala asembleo de la kunproprietuloj de la domaro, kie situas nia sidejo voĉdonis gravajn sed necesajn riparojn por la tegmento, la kamentoj por la gasa hejtado kaj la plafono de la keloj. Tio pligravigis niajn elspezojn por la sidejo je 10 527, 23 € kontraŭ 6 013,84 lastjare. Feliĉe, la plialtigo de la kotizoj decidita de la kongreso 2007 ebligis kovri tiujn neatenditajn elspezojn sen tro perturbi niajn financojn. La aliaj elspezoj estis kvazaŭ stabilaj krom la presado de *La Sago* kiu plialtiĝis je proksimume 1 000 €. Malgraŭ tiuj elspezoj, la komitato decidis ne plialtigi la kotizojn por la jaro 2011.

La nombro da membroj estis kvazaŭ stabila je 685 kontraŭ 688 lastjare. Ni esperas ke la kreado de novaj grupoj pere de niaj lokaj kaj regionaj perantoj ebligos varbi novajn membrojn. Ne forgesu nian Solidarkason, kiu ebligas helpi niajn membrojn senlaborajn, malsanajn aŭ kun eta pensio. Dankon por ili.

La kompleta bilanco de ĉiuj kontoj, posedadoj, stokoj kaj ŝuldoj de la asocio estos prezentata al la membroj dum la venonta kongreso en Hillion dum Pasko 2010.

La kasisto :
André Sadier

KONTOJ 2009

ENSPEZOJ		ELSPEZOJ	
Normalaj kotizoj	22 591,30	Presado Revuo	8 490,58
Subtenaj kotizoj	3 351,25	Sendado Revuo	3 734,97
Reduktitaj kotizoj	165,25	TVA	498,05
Abonoj / Kursoj	2 470,03	Informservo	640,00
Donacoj / Rentoj	3 008,46	Kores./Tel/Internet	2 091,58
Fonduso Sidejo	197,50	Funkciado Sidejo	10 527,23
Ĝiro Pariza Grupo	21,87	Asekuroj	1 539,16
		Impostoj	1 403,86
		Subtenkotizo al SAT	732,00
		Kotizol al aliaj asocioj	1 119,47
		LEA Komitato	22,50
	31 805,66		30 159,40
Saldo 01/01/2009	70 841,64	Saldo 31/12/2008	72 487,90
	102 647,30		102 647,30
SOLIDARKASO 2009			
Saldo 01/01/2009	260,80	Elspezoj	5 250,00
Enspezoj	5 763,00	Saldo 31/12/2009	773,80
	6 023,80		6 023,80

La kontoj de la Asocio kaj de la Solidarkaso estis kontrolitaj la 30an de januaro 2010 fare de Lea CHEVROLAT kaj Lucienne COUDRAY

Malaltiĝis la aĉetpovo !

laŭ popola fabelo, transskribita esperantlingve far Fil' ekologie eldonita sur komplete reciklitaj bildoj far Sir'



Kunlaboren plu!

Da referendumiloj responditaj ĉi foje 101 atingis la sidejon (sed unu sennoma do nevalida, tiel ke la nombroj ĉi sube aperantaj estas ankaŭ elcentaĵoj!), similkvante kiel pasintfoje. Kiel ĉiujare nur la unua demando (A) estas fakte referendumo, la cetero estas simpla demandaro, kiu ebligas kolekti informojn pri la agado de la membraro k helpas organizi ĝin pli efike kadre de kunlabora aktivado.

En 2009 la referendumo parto (kontrolita de Julietoj Buajero [Boyer] k Ternanto [Ternant]) koncernis du punktojn. La fakto ke ambaŭ estis mise vortumitaj (en la unua mankis la demando «ĉu vi konsentas?» k en la dua forsaltis vorto «por» post la sumo!) feliĉe ne tro perturbis la voĉdonantojn:

A1- Voĉdono pri la komitata listo.

Jes: 83, Ne: 0, Sindeteno: 6 (ne respondis 11).

A2- Voĉdono pri la monprunto. Jes: 63, Ne:3, Sindeteno: 22 (ne respondis 12). La relative granda kvanto da sindetenoj eble fontas el tio, ke tiuj, kiuj ne ĉeestis la kongreson en Paŭo ne havis okazon multe informiĝi ĝis nun tra La Sago pri tiu dokument-filma projekto pri Esperanto k sekve prave hezitis decidiĝi pri ne bagatela sumo. Ĉi numero korektas tion (vd. la suplementon).

B- Kongrespartopreno. Jes: 27, Ne certe aŭ Certe ne: 70.

C- Priasociaj rimarkoj. Esprimitas, ke «kongreso samloka kiel tiu de aliaj e-asocioj (NDLR: kiel okazos fakte en 2011 en Seto [Sète]) estas nekongruigebla pro tempo- k spacmanko». Evidente en tia interasocia renkontiĝo nepras kompromisoj, k la komitato atentigas, ke en 2011 la asocioj povu k ĝui la eventon k efike partopreni sian kongreson. Alia ano indikis, ke «kvankam tute ne kompetenta, mi volonte akompanus la filmo-projekton de la SAT-eldonfako nome de SAT-Amikaro», kio estas tre bona propono! Alia membro, leginte la statutojn, demandas pri la rolo (akorde kun ĝia celo) de SAT-Amikaro k ĝia organizado, koncize: «Ĉu ne gravas, ke SAT-Amikaro pli bone difinu sian starpunkton?» Ja kerna demando, debatota dumkongrese!

Ĉ- Aktivado. Dankon al la kontribuemuloj kies informoj estos transdonitaj al la koncernaj

kunordigantoj por plua utiligo. Ni citas nur la kvanton da respondintoj por ĉiu punkto:

- 1- informade: 8
- 2- komputile: 16
- 3- rete: 8
- 4- kontrole, traduke: 8
- 5- revue: 10
- 6- eventorganize: 5
- 7- manifestacie: 16
- 8- lokperante: 8
- 9- sideje: 6
- 10- lokgrupe: 9

D- Kongresorganizo. 3 jesaj respondoj. Unu temas pri propono en Seto (Sète) en 2011, akceptita de la komitato (la OKK jam arde laboras pri tiu interasocia renkontiĝo dum kiu kongresos ankaŭ SAT-Amikaro). Alia aludas eblecon en Etampo (Etampes), sed mankas homfortoj surloke. Alia anoncas sin por 2020! Do restas lokoj por multaj pliaj proponoj dum ĉi jardeko...

E- La Sago. Ne pardoneble, ni ĉi jare denove forgesis meti la Jes/Ne-kvadratojn por la respondoj! Malgraŭ tio 21 klare indikis jeson. Menciitas, ke «la aspekto, la enhavo de La Sago multe pli progresis», «ĝi iĝas pli interesa». Alia ano «ŝatus ricevi ĝin rete». Tiurilate indas precizigi, ke de la oktobra numero la tri unuaj paĝoj plus la lasta estas sisteme enretigitaj k elŝuteblaj PDF-e. Jam de jaroj la franclingva suplemento estas entute elŝutebla. Projekto ankaŭ estas enretigita iom post iom pasintajn numerojn. Aliaj rimarkoj: «rubriko pri la historio de la SAT-movado estus bona», «rubriko Leginda legendo tre bona!», «en la FrSup estus bone havi konstantan angulon kun klarigo pri kio estas SAT-Am (lab. e-asocio) k fulmlecionon pri iu gram. punkto», «tre kontentas pri la enpaĝigo!».

F- Prezento de Eo publike. Jes: 22, Ne: 21.

G- E-instruado. 27 instruas per tre diversaj metodoj.

Ĝ- Kontaktotransdono. 53 konsentas lasi kontakteblecon al interesatoj.

H- Ne-e-istoj. 3 adresoj indikitaj.

Ĥ- Al SAT-movado varbindaj e-istoj. 5 adresoj.

I- NeSATanoj. 4 deziras ricevi informojn pri SAT.

Konklude indas substreki, ke ĉi iom modifita demandaro ebligis ĉi jare kolekti iom pli (k pli precize) da informoj pri la agado de la unuopaj membroj, - aparte dankinda estas la klopodo de sufiĉe multaj indiki precize ĝisdatajn informojn pri lokaj kursoj -, k nun restas la defio trafe utiligi la materialon por interkontaktigi la taŭgajn homojn por pli da kunordigita agado, kio ekatingas kie lokaj perantoj funkciigas vigran kunlaboradon k regule interrilatas kun la sidejo k inter si.

Ni daŭrigu plekti organizitan kunlaborigan homretaron!

Por la komitato,
Vito Markovo (sekretario)

Selle humuraĵoj



Kiam la bankizo fandiĝas...



Senbrida reklamado



Libro vivas pli longe ol unu sezono...

Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.



Paĉjo, kio estas rasismo?

Tahar Ben Jelloun, tradukis Armela LeQuint kaj Ĵak Le Puil, eld. UEA, Roterdamo, 1999, 52 paĝoj, 7,50 € en la libro-servo de SAT-Amikaro.

Ĉar tiu numero plenplenas, jen maldika libro kun rapida prezento. Poul Thorsen skribis pri «Paĉjo» en LKK-93 de

januaro 2000:

«Apartismo! Koloniismo! Genocido! Tiaj kaj certe pli malicaj kliŝoj frontis marokdevenan verkiston dum kontraŭregistara manifestacio en Francio. Lia akompananta filino dekjara, direktis, direktadis tiom da

«tiklaj» demandoj, ke li decidis ĉion prezenti en libreto kun adekvataj respondoj.»

Notindas, ke la esperanta titolo reprenas tiun de la nederlanda traduko, kiu fakte estas multe pri trafa ol la originala titolo: «La rasismo klarigita al mia filino.»

Jen mallonga ekstrakto. Unue parolas la patro:

– ...Vi devas forpeli de via vortrezoro tiujn ŝablonajn esprimojn kiel «araba laboro», «flava danĝero», «laboregi kiel negro», ktp. Tiujn stultajojn oni devas kontraŭbatali.

– Kiel?

– Unue, lerni respekton. Respekto estas esenca. Cetere, la personoj ne postulas ke oni amu ilin, sed ke oni

respektu ilin en ilia homa digneco. Atento kaj konsidero, jen kio estas respekto. Ankaŭ scii aŭskulti. La fremdulo ne postulas amon kaj amikecon, sed respekton. Amo kaj amikeco povas veni poste, kiam oni pli bone konas kaj estimas unu la alian. Sed komence oni nepre ne havu antaŭjuĝojn. Nu, rasismo disvolviĝas dank'al antaŭjuĝaj ideoj pri popoloj kaj ties kulturoj. Jen aliaj ekzemploj de stultaj ĝeneraligoj: la skotoj estas avaraj, la belgoj ne tre

spritaj, la ciganoj ŝtelemaj, la azianoj insidemaj, ktp. Ĉiu ĝeneraligo estas kretena, kaj erarfonto. Tial oni neniam devas diri: la araboj estas tiaspecaj aŭ alispecaj», «la francoj tiaj aŭ tielaj...», ktp. Rasisto estas tiu kiu ĝeneraligas ekde individua kazo. Se arabo priŝtelis lin, li konkludus el tio ke ĉiuj araboj estas ŝtelistoj. Por respekti la aliajn, necesas havi justecsenton.

Ĵak Le Puil

Selle humuraĵe



La ideologia graveco de ĉokolado kaj monbileto



Nacia identeco?

«Mond-civitan(in)o antaŭ ĉio»

Responde al la interesa artikolo de Jean-Jacques el Dijono (La Sago de februaro 2010, Fr:sup.), mi volas sciigi ke Daniel Durand la plej agema franca mondcivitano, responsulo pri la Internacia Registro de la Mondcivitanoj, estis invitata prelegi dum la **SAT amikara kongreso en Hillion**.

Li konsentis paroli pri Mondcivitaneco kaj pri la agadoj de «Monda Solidareco», precipe numtempe en Afriko. Pasintan monaton Daniel revenis de Burkina Faso, «Citoyen du monde avant tout» skribis Jean Jacques Aumenier.

Jes, se ni deziras pluvivi sur nia planedo, ni bezonas mondajn instituciojn por solvi la mondajn problemojn koncerne ekologion, ekonomion, malsaton, homajn rajtojn, demokration, justecon, pacon.

Multaj homoj sin deklaras «mondcivitanoj» sed ĉu tio sufiĉas se ili ne kune organiziĝas? Ĝis nun la legitimarko de mondcivitano estis simbolo, ne sufiĉa por trapasi landlimojn. Sed ĝi permesas voĉodoni je la «kongresoj de la popoloj». Se pli kaj pli

da homoj voĉdonas, la naciaj registaroj estos devigataj konsideri tiun eventon. Ni bezonas pli kaj pli da voĉdonantoj por savi la terloĝantojn.

Iam la Mondcivitanoj influis naciajn registarojn. Ĉu vi memoras pri kio okazis la 11an de marto 1989?

En Hago, (Nederlando) la ĉefministroj de Francio (M. Rocard) kaj de Nederlando lanĉis alvokon inspiritan de la Mondcivitanoj por starigi supranacian ekologian aŭtoritaton: 43 landoj aprobis ĝin kaj aliĝis. Bedaŭrinde mankis aliĝoj de grandaj landoj: Usono, Sovetunio, Britio.... Sed espero naskiĝis.

En Bretonio, post serio da «nigraj tajdoj» okazis pli da internacia kontrolo.

Mondaj institucioj = utopio? Ofte ni povas konstati ke la hodiaŭa utopio iĝas morgaŭa realeco.

Ni fidu Jean Rostand, Alfred Kastler, Hubert Reeves, Albert Jacquard, Abato Pierre kaj aliajn konatajn aŭ ne konatajn homojn kiuj sin deklaris «Civitanoj de la Mondo», enregitriĝis kaj agadas tiucele.

Gaby Tréanton

Espéranto: vers une culture sociale sans frontières

un projet «Coopérative SAT-EFK»

Le film-documentaire «Espéranto»

Au congrès de Pau de SAT-Amikaro le principe a été adopté de prêter à SAT-EFK la somme de 50 000€ pour la réalisation par un professionnel d'un documentaire sur le mouvement espérantiste.

En quelques mois, tout en tenant compte de l'attente du résultat du référendum qui devait valider ce prêt, nous avons réfléchi puis recruté le réalisateur. Il s'agit de Dominique Gautier.

Ce choix est très important car c'est lui qui va écrire et réaliser le film. Ce documentaire sera son oeuvre, construite bien sûr en fonction de ce que nous allons lui apporter.

L'idée pour nous est bien sûr de disposer à la fin d'un film de qualité professionnelle, mais surtout de pouvoir proposer un film qui n'est ni

un descriptif de l'espéranto et du mouvement, ni un film de propagande.

C'est ce regard d'un réalisateur sur notre mouvement qui importe et qui donnera toute sa force au film.

Le tournage est maintenant commencé. Lors du congrès d'Hillionnousaurons l'opportunité d'une rencontre avec Dominique Gautier pour que chacun puisse poser ses questions et apporter son avis sur le contenu du film. Il va également filmer, interviewer, etc. Merci de lui accorder le meilleur accueil.

Par la suite il va également falloir renforcer l'équipe de travail sur le film. Car il va rester à mettre en place la réalisation des traductions et la prévente (puis la vente) du DVD. Là où c'est possible il faudra également voir avec les chaînes de télévision (locales ou du câble essentiellement) pour qu'elles achètent et diffusent le documentaire. L'enjeu financier est bien sûr important, mais bien évidemment plus le film sera vendu et diffusé plus l'espéranto sera connu.

Et c'est bien là le but poursuivi..

Frédéric Scibor

Filmographie partielle de Dominique Gautier:

LOUIS BARTHOU, l'homme politique et son Béarn, (1982)

FRANCIS JAMES, l'oeuvre du poète, (1986)

JOSEPH PEYRE, la vie et l'oeuvre de l'écrivain, (1987)

GUERRILLERO, le rôle des résistants espagnols pendant la guerre 39-45, Prix Jean ROUCH 1997 et Prix François SCHACHTER à PARIS en 1997, (1996)

ASPE UNE VALLEE EN SURSIS, Collectif de la vallée d'Aspe contre le projet du tunnel du Somport, film militant principalement tourné dans la vallée de la Maurienne (tunnel du Fréjus), (1995)

STATION DEBOUT PENIBLE, témoignages d'handicapés physiques sur leurs conditions de vie, (2000)

PAROLES DE PERES, la paternité à travers le témoignage de sept pères ordinaires, (2002)

LES MAQUIS DE L'IMPOSSIBLE ESPOIR, de 1940 à 1957 des Républicains espagnols organisent en Cantabrie une résistance héroïque; 2 survivants témoignent, (2003)

EPEJO ROJO, un Républicain espagnol à travers le siècle et l'Europe, des années 20 à nos jours, (2005)

LE CRI DU SILENCE, la chronique de l'exhumation, en juin et juillet 2004, de 22 corps jetés par les franquistes dans les fosses communes du village de Santaella, (2006)

CONFIDENCES CUBAINES, rencontres avec des Cubains anonymes, la vie quotidienne aujourd'hui à Cuba, (2007).

LAÏCITE, la loi de 1905 et réflexion sur ses remises en cause, entretiens avec H.Pena Ruis, J-P Scott, ... (2007)

FILS DE ROJO, portrait de Jean Ortiz, fils de Républicain espagnol, engagé dans la bataille pour la mémoire historique et la revendication de la 3ème République, (2009)

LO QUE ME CONTO ABUELITO, histoire de l'immigration béarnaise en Argentine au 19° et 20° siècle, (2009)

Dominique Gautier

Né à Bordeaux en 1953, Dominique Gautier a réalisé de nombreux documentaires, parfois pour la télévision, pour des entreprises (films publicitaires ou institutionnels) mais souvent pour le compte d'associations.

Cette habitude à travailler avec le mouvement associatif est pour nous un très grand atout.



Quelques informations sur le tournage du documentaire «Espéranto» (titre provisoire)

Le scénario définitif n'est pas encore rédigé, mais il arrive souvent, dans la réalisation d'un documentaire, que des tournages importants soient entrepris, généralement pour des raisons de calendrier. Cela a été le cas pour nous à trois reprises. Le 8 janvier nous avons passé la journée dans le studio de Vinilkosmo et assisté à l'enregistrement par Floréal d'un texte chanté par Jomo. Cela a été aussi l'occasion de filmer leurs interviews. Le 27 janvier c'est à Villeneuve d'Aveyron que nous nous sommes rendus pour

rencontrer HORI Yasuo, membre du bureau de l'Universal Esperanto-Asocio, accompagné de ARAIToshinobu, deux Japonais qui proposaient une série de conférences en France. Ils étaient invités par André Andrieu, espérantiste et auteur du dictionnaire édité par SAT-Amikaro. Nous avons réalisé deux interviews et nous les avons suivis dans diverses activités. Du 12 au 17 février nous avons réalisé un important travail de tournage à Bialystok. Christophe Chazarein, qui travaillait dans l'association

espérantiste de la ville, avait parfaitement organisé notre séjour pour le rendre très efficace et très agréable. Nous l'avons suivi dans ses activités au sein de l'association et recueilli son témoignage. Nous avons ensuite rencontré et interviewé: Nina, Lukas, Pczemek, Monica Laminska, Iza Lysko au cours d'une visite de l'itinéraire «esperanto» de la ville, Brunetto Cassini, le professeur Kijowski, le Maire adjoint Aleksander Sosna, Mr Lechowski le directeur du Musée de Podlachie, Jan Leonczuk le directeur de la Bibliothèque de Podlachie, le directeur du Centre Zamenhof, Elzbieta la présidente de l'association d'esperanto, Barbara journaliste espérantiste et membre de l'académie, l'historien Zbigniew Romaniuk et pour finir nous avons rencontré l'équipe de TV Bialystok. Au total cela fait 11 heures d'enregistrement. C'est beaucoup mais la séquence «Bialystok» sera une séquence importante du film. Maintenant il nous reste à élaborer le scénario définitif pour affiner le travail de tournage et le présenter lors de notre prochain déplacement les 3, 4 et 5 avril à Hillion.

Dominique Gautier

■ *La Voix du Nord* du 16 janvier publie un article intitulé **Deux Japonais au collège Molière pour promouvoir l'esperanto.**

Grâce à l'esperanto, les deux Japonais ont parcouru beaucoup de pays et de chacun, ils ont ramené des instruments de musique.

EDUCATION| **Hier matin, Hori Jasuo et Arai Toshinobu, deux Japonais ambassadeurs de la langue esperanto, sont passés au collège Molière et au collège Rimbaud pour sensibiliser les collégiens à la langue universelle.**

PAR VIRGINIE CARTON (villeneuve-dascq chez lavoixdunord.fr)

D'abord enfiler l'habit, ensuite ouvrir la mallette à surprises. Enfin ne plus parler que l'esperanto. Face aux deux Japonais sillonnant la planète pour répandre - non pas la bonne nouvelle mais presque - l'esperanto, les élèves de sixième sont tout ouïe. «Plus qu'une langue, c'est un moyen d'apprendre le respect de l'autre, la fraternité, l'universalité», défend Michel Dechy, professeur du collège Molière à la retraite, président du

club Esperanto de Lille. «C'est une langue très facile à apprendre, mélange de langues existantes. Un mois d'apprentissage correspond à un an pour une autre langue. On ne peut pas faire de faute d'orthogra-



phe: une lettre égale un son, un mot égale une multitude de mots. Sur les 28 lettres de l'alphabet, 18 sont identiques au français». Facile donc, mais à quoi ça sert?

Bien sûr, on a tous en tête des images de

France3.fr - 14 janvier 2010 - Strasbourg : l'esperanto dans les audio-guides



■ *France3.fr* publie le 14 janvier un reportage avec une interview du président de l'Association Mondiale d'Espéranto intitulé **Espéranto, langue touristique.**

Strasbourg : l'esperanto dans les audio-guides

Par Maxime Villirillo

Communiquer en esperanto pour élargir le public des touristes utilisant un audio-guide.

Le président de l'association mondiale d'esperanto milite pour la pratique de cette langue dans les guides touristiques

Depuis hier, l'Alsace accueille un visiteur de prestige : Probal Dasgupta président de l'Association Mondiale d'Espéranto. Il est venu d'Inde pour assurer la promotion de cette langue peu connue du grand public. Aujourd'hui, l'Espéranto est parlé par 100 000 à 10 millions de

locuteurs dans le monde.

Imaginez une langue qui ne soit pas l'italien, ni le portugais, pas davantage le romanche mais un peu de toutes les langues d'Europe. L'esperanto a été inventé à la fin du XIXe siècle par Ludwik Zamenhof pour abolir les barrières entre les cultures. En Alsace, Cyrille Hurstel est l'un des animateurs de la communauté esperantophone. Il a ainsi créé un audio guide pour les touristes venus visiter Obernai. Une initiative destinée à faire connaître et reconnaître ce langage universel, qui a du mal à peser face au rouleau compresseur qu'est l'anglais.

Source : <http://alsace.france3.fr/info/Strasbourg--l-esperanto-dans-les-audio-guides-60297236.html>

Bas-Rhin : l'esperanto, langue touristique

Depuis hier, l'Alsace peut s'enorgueillir de la présence d'un visiteur de prestige. Probal Dasgupta président de l'Association Mondiale d'Espéranto, il est venu d'Inde pour assurer la promotion de cette langue peu connue du grand public, mais qui est parlée par 100 000 à 10 millions de personnes.



Probal Dasgupta
Président de l'Association Mondiale d'Espéranto



Bas-Rhin : l'esperanto, langue touristique

Depuis hier, l'Alsace peut s'enorgueillir de la présence d'un visiteur de prestige. Probal Dasgupta président de l'Association Mondiale d'Espéranto, il est venu d'Inde pour assurer la promotion de cette

partisans de l'espéranto défendant la langue lors des campagnes présidentielles dans des spots un peu idéalistes.

Dans la classe, hier matin, les jeunes, en tout cas, étaient séduits: «J'en avais déjà entendu parler dans mon école primaire. Ça donne envie de l'apprendre», confiait Louis, 11 ans. «J'aime bien cette langue, elle est agréable à entendre», se réjouissait Camille. «Ce serait bien de la connaître, on pourrait aller partout», songeait Alicia.

Et oui, c'est là le but des adeptes de l'espéranto: que tous les humains parlent une langue commune et puissent communiquer plus facilement les uns avec les autres et voyager. Ça n'est pas une secte, garantit Michel Dechy: «Une secte, c'est très facile d'y entrer, très difficile d'en sortir. L'espéranto est une langue libre, créée il y a cent ans, que même le pape utilise dans ses bénédictions».

Preuve de l'ouverture d'esprit qu'offre la pratique de cette langue, les deux intervenants japonais avaient amené avec eux une multitude d'instruments de musique de tous les pays qu'ils ont pu traverser grâce à l'espéranto. Un échange ludique, instructif qu'ont beaucoup apprécié les sixième de Molière, grâce au foyer socio-éducatif qui avait organisé la rencontre, puis dans l'après-midi, les cinquième du collège Rimbaud.

Source: http://www.lavoixdunord.fr/Locales/Villeneuve_d_Ascq/actualite/Sec-teur_Villeneuve_d_Ascq/2010/01/16/article_deux-japonais-au-college-moliere-pour-pr.shtml

Campagne de pétition pour l'espéranto au Bac et à l'école

■ Une nouvelle campagne de pétition est en préparation. Prévue de grande envergure, elle sera coréalisée par SAT-Amikaro et Espéranto-France, à laquelle pourront bien sûr ce joindre les associations thématiques.

Un préprojet a été proposé aux deux Comités des deux associations qui ont donné un accord de principe sur le projet et désigné des représentants pour un groupe de travail interassociatif.

La première réunion de ce groupe de travail, après des échanges par courriel, a lieu début mars. Elle doit affiner le projet (déroulement, calendrier, rédaction du texte, budget, etc.) qui sera alors proposé à nouveau à chacune des deux associations.

Frédéric Scibor

■ *Ouest-France* du 26 janvier publie un article intitulé **L'espéranto, les Santerre le parlent avec le monde entier**.

Herbignac

Trois questions à **Jean-Yves Santerre**, président de l'association Herbignac-Espéranto.

Qu'est-ce que l'espéranto?

C'est une langue internationale initiée par le Polonais Zamenhof en 1887 pour faciliter les échanges partout dans le monde. Nous avons découvert son existence par hasard en 1989, lors d'une réunion d'information à Saint-Nazaire. Construite pour être facile à apprendre et à prononcer, elle ne comporte aucune exception grammaticale.

À quoi sert cette langue universelle?

Depuis que nous pratiquons cette langue, nous avons eu de multiples contacts extrêmement intéressants avec d'autres espérantistes à travers le monde. Quelques-uns sont venus nous rendre visite à Herbignac et nous ont apporté des souvenirs de Chine, du Japon, de Russie, du Danemark, de Finlande, de Turquie, et de bien d'autres pays. Nous avons reçu de nombreux courriers venant des cinq continents.

Votre passion est-elle partagée à Herbignac?

Dès le mois de septembre 1991, nous avons organisé une réunion d'information avec «Ferdì» et Jeannine, nos professeurs et amis de Saint-Nazaire. Aujourd'hui, treize adhérents fréquentent régulièrement notre association et Herbignac est autorisée à afficher l'étoile verte à cinq branches. Elle caractérise les villes où l'on peut parler cette langue.

Contact: jys.mys chez clubb-internet.fr

Source: http://www.ouest-france.fr/actu/actuLocale_-L-esperto-les-Santerre-le-parlent-avec-le-monde-entier-_44072-avd-20100126-57552832_actuLocale.Htm

fr/actu/actuLocale_-L-esperto-les-Santerre-le-parlent-avec-le-monde-entier-_44072-avd-20100126-57552832_actuLocale.Htm

■ Ce même *Ouest-France* du 26 janvier publie un article intitulé **L'espéranto arrive en Mayenne - Laval**.

La jeune association Net'entraide, rassemblant des jeunes «passionnés d'informatique», fête son premier anniversaire en janvier.

À cette occasion, son président Yoann Nabat veut «développer l'espéranto en Mayenne par le biais de l'informatique». Le projet de l'association est de proposer des cours d'espéranto sur le site de l'association. Grâce à un partenariat avec la mairie de Laval, des locaux vont être mis à la disposition de Net'entraide afin de promouvoir l'apprentissage de la langue «de manière dynamique et vivante». «En quelques heures, on peut la maîtriser complètement», insiste Yoann Nabat. Net'entraide entend également,



à travers l'espéranto, aider des personnes du monde entier autour de problèmes informatiques.

<http://www.klako-en-esperto.org>
Source: http://www.ouest-france.fr/actu/actuLocale_-L-esperto-arrive-en-Mayenne-_53130-avd-20100126-57552234_actuLocale.Htm
http://www.ouest-france.fr/actu/actuLocale_-L-esperto-arrive-en-Mayenne-_53130-avd-20100126-57552234_actuLocale.Htm

Matériel d'étude

■ La cassette audio du Cours Rationnel est téléchargeable sur le site de SAT-Amikaro:

<http://www.esperanto-sat.info/rubrique153.html>

■ La cassette audio du Junulkurso est disponible sous forme de CD, à la librairie SAT Amikaro - 132-134, Boulevard Vincent-Auriol - 75013 Paris - 01.44.24.50.48



ESPERANTO ARMOR 2010

3-6 Avril



<http://kongreso2010.sat-amikaro.org>

65^a KONGRESO de SAT-amikaro

Comment atteindre le centre de congrès «Espace Georges Palante»

à HILLION

2, rue Ollivier PROVOST 22120 - HILLION

Par le train:

Atteindre la gare SNCF de St Brieuc.

SVP, annoncer votre heure d'arrivée en gare SNCF en remplissant le bulletin d'inscription de vos horaires d'arrivée et de départ; un service de co-voiturage en direction d'HILLION pourrait être organisé.

Autre possibilité à partir de la gare SNCF de St Brieuc:

A 10 min à pied, se rendre à la gare urbaine des TUB (transports urbains briochins).

Pour se rendre à la gare urbaine:

En sortant de la gare SNCF sur votre droite, emprunter le boulevard Charner jusqu'au rond-point; à ce rond-point du boulevard Clémenceau dirigez-vous sur votre gauche en direction du centre ville;

au bout de ce boulevard sur votre droite se trouve la gare urbaine des «TUB» (transports urbains briochins).

ligne 60 – gare urbaine – HILLION Centre.

Ticket unitaire: 1€

Carnet de 10 tickets: 8,70€ (valable 1h).

www.tubinfo.fr

En voiture:

En arrivant à RENNES:

N136 **ROCADE NORD** – LORIENT – BREST – SAINT-MALO (15 km environ)

N12 SAINT-BRIEUC - BREST – PACE

Continuer sur: N12 / E50 (80 km)

Prendre sortie en direction de: SAINT-RENÉ - GARE D'YFFINIAC – HILLION

Au rond-point, prendre la 2^{ème} sortie
Continuer sur: **D81** en direction

d'HILLION

Suivre l'indication HILLION – (environ 6 km) entrer dans HILLION –

l'espace Georges Palante est indiqué sur votre gauche dès le centre bourg après le premier virage à votre droite.

En bateau ou à la nage:

Il est indispensable de consulter l'horaire des marées pour atteindre le port de St Brieuc «Le Légué», ou de s'échouer sur la plage d'Hillion.

En cas de problème n'appellez pas la SNSM ou le CROS mais les téléphones portables suivants:

- Philippe	06 76 29 90 11
- Laurent	06 31 57 84 44
- Alain	06 76 46 89 29
- Franjo	06 76 27 51 78

Renseignements utiles

Permanence au siège

Lundi	18h30 - 19h30
Mardi	10h00 - 16h00
Mercredi	14h30 - 18h00
Jeudi	15h30 - 18h30
Vendredi	09h30 - 19h30
Samedi	11h00 - 18h00

Cours oraux au siège – pour débutants:

Les lundis 17H30 avec Georges Meilhac
Les mercredis 14H30 avec Hélène Bonjour.
Les samedis 14H00 avec Vincent Charlot

Cours par correspondance d'espéranto : inscription directe auprès de :

C. Gerlat 11 bd M-al Leclerc 38000 Grenoble 0476 01 91 71 claud.gerlat@orange.fr

Retrouvez toute la liste des cours d'espéranto sur le site de SAT-Amikaro, rubrique «Cours d'espéranto»: <http://esperanto-sat.info/rubrique97.html>

Cette rubrique tente de référencer un maximum de cours d'espéranto se déroulant en francophonie. Pour toute mise à jour ou cours manquant, nous contacter.

Service Librairie par correspondance pour les adhérents (catalogue sur demande)

Au siège; Net: <libroservo@sat-amikaro.org>

Contributions pour ce supplément à envoyer :

- de préférence par internet, à lasago@free.fr, en format RTF ou TXT pour un document joint, ou directement dans le corps même du message, et en format TIFF, JPEG ou GIF pour les images.
- éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (les erreurs éventuelles sont à indiquer dans la marge) à envoyer à: **Serge SIRE, La SAGO 85 impasse des Fées 74330 Sillingy**

Renseignements sur l'espéranto:

FRANCE : SAT-amikaro 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
 BELGIQUE : Claude Gladys, Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine
 SUISSE : Mireille Grosjean, Grand-rue 9, CH-2416 Les Brenets.

LA SAGO. CPPAP n° 0307 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Senart.

Dépot légal à parution.

LA SAGO - Mars 2010.

Espéranto

vers une culture sociale sans frontières

Utilaj informoj

Sidejo:	Lunde	18h30 - 19h30
deĵor-	Marde	10h00 - 16h00
horoj	Merkrede	14h30 - 18h00
	ĵaŭde	15h30 - 18h30
	Vendrede	09h30 - 19h30
	Sabate	11h00 - 18h00

■ Kursoj.

Por la unua grado, vidu lastan paĝon de la franclingva suplemento.

Ĉe la sidejo:

Parolaj perfektigaj kursoj dua grado : ĉiun merkredon, je la 16a, kun Phil Guichet, ĉiun ĵaŭdon, je la 15a, kun Élisabeth Barbay, kaj ĉiun vendredon je la 17a kaj duono, kun Vito Markovo.

Trigrado: ĉiun sabaton, je la 16a kun Vincent Charlot.

La Babilrondo de SAT-Amikaro okazas ĉiun duan merkredon de la monato, je la 11h45 gxis 14h30 kun Thérèse Pinet.

■ **Perkorespondaj kursoj, dua kaj tria grado:** Claude Gerlat

38 €. (senlaboruloj kaj ĝis25jaraĝaj junuloj : 19 €.) Ĉeko profite al SAT-Amikaro.

Pedagogio: Mireille Grosjean, Serĝo Sir'.

Kotizoj 2010 al SAT-Amikaro, inkluzive de abono al "La SAGO": 35€

Prezo por unu ekzemplero: Francio, Belgio: 3,60 €; Svisio : 3,80 F.S. ; aliaj landoj: 4,60 €.

Abono 2010 al la revuo, sen aliĝo al SAT-Amikaro: Francio, Belgio : 32 €; Svisio : 43FS; aliaj landoj : 39 €.

Por pagi:

■ **En Francio:** SAT-Amikaro

CCP: 37 852 90 L La Source.

N° IBAN, (por pagi el fremda lando):

SAT-AMIKARO.

FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314

BIC: PSST FRPPSC

■ **En Belgio:** Claude Glady :

Bankkonto N° 750-6373051-18

IBAN B50 7506 3730 5118 BIC: AXABBE22

■ **En Svisio:** Mireille Grosjean :

Poŝta konto n° 23-14908-9.

Kiu faras Kion?

Directeur de la publication: Guy Cavalier.

Ĉefredaktanto : Vito Markovo.

Enpaĝiganto: Serĝo Sir'.

Korektskipo : Andreo Andrio, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir'

Helpas al la korektado: Janine et Yannick Dumoulin, Veronique Girard, Phil Guichet, Maksimiliano Gverino.

KONTRIBUAĴOJ BONVENAJ! SENDU ILIN:

■ Prefere per reto, al lasago@free.fr, tekstoj en RTF aŭ TXT formo por aneksitaj dokumentoj, eventuale en la korpo mem de la mesaĝo, skribitaj per ajna sistemo de ĉapeligo (sed Unikodo preferata), bildoj en TIFF, JPEG aŭ GIF formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj *prefere* tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) al La SAGO, ĉe Serĝo Sir'. (ne tajpitaj kontribuoj publikblas nur se troveblas volontula tajpanto)

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Adresaro

La SAGO-abonoj: ĉe la sidejo,

La SAGO-redaktado: ĉe Serge Sire.

Sidejo de SAT-Amikaro: 132/134 boulevard Vincent-Auriol 75013 Paris

Tel. : 01 44 24 50 48 kaj 01 44 24 50 02

TTT-ejo : <http://www.esperanto-sat.info>

Reto: sat-amikaro@wanadoo.fr

Claude Gerlat 11 bd Maréchal Leclerc 38000 Grenoble tel. 04 76 01 91 71

Reto : claud.gerlat@orange.fr

Claude Glady : Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine; Reto: cglady@arcadis.be
Tel: 071/64 49 16 (en Belgio).

Mireille Grosjean : Grand-rue 9, CP 9 CH-2416 Les Brenets

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy
Reto : lasago@free.fr

SAT: Abono al "Sennaciulo" 2010: 57 €

■ **En Francio:** Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

■ **En Belgio:** Jakvo Schram; Hof Ter Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).

**Atentu !
Nova peranto en Belgio.
Bonvenon !**

Kiel traduki **Fin**

■ La duan parton de tiu artikolo mi dediĉas al la adjektivo *fin/fine*, kiu ricevas diversajn signifojn: **fajna, delikata, akra, subtila, sagaca, maldika, ekstrema, ktp**, kaj multe pli diversajn tradukojn.

Ĉi-sube estas kelkaj ekzemplaj frazoj:

Des bijoux en or fin.	Juveloj el fajna oro.
Le jade est une pierre fine.	Jado estas fajna gemo.
Sur la table de fête il y a des vins fins.	Sur la festotablo estas delikataj vinoj.
Elle a acheté de la lingerie fine.	Ŝi aĉetis delikatajn subvestojn.
Une fine dentelle.	Delikata punto.
Le cuisinier utilise des fines herbes.	La kuiristo uzas aromherbojn.
La fine fleur de la littérature.	La plej elstaraj beletristoj.
Il a l'oreille fine, il entend tout.	Li havas akrajn orelojn, li aŭdas ĉion.
Il n'a pas l'oreille fine d'un amateur de musique.	Li ne havas la fajnan orelon de muzikamanto.
Un cuisinier doit avoir le nez fin.	Kuiristo devas havi bonan nazon.
Voilà une remarque fine et spirituelle.	Jen rimarko subtila kaj sprita.
Un esprit fin.	Subtila spirito.
Un fin connaisseur.	Subtila spertulo.



Un fin gourmet.	Subtila frandemulo.
Il se croit plus fin que les autres.	Li kredas sin pli sagaca ol la aliaj.
Le capitaine a fait une fine manœuvre.	La ŝipestro lerte manovris.
Ne joue pas au plus fin!	Ne subtilu!
Tu as l'air fin!	Vi aspektas stulta!
Du sel fin.	Subtila salo.
Une pluie fine.	Pluveto.
Des cheveux fins et soyeux.	Haroj maldikaj kaj silkecaj.



LibroServo

Sat-Amikaro libroservo

132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
 Telefono : 01 44 24 50 48 (Vendrede 9H30-17H;
 Sabate 11H-18H)
 Retadreso: libroservo@sat-amikaro.org
 CCP : Sat-Amikaro LibroServo Paris 261211 57 G



Sendkostoĵ
 Al ĉiu mendo
 aldonu:
 40 % ĝis 5€
 35 % ĝis 10€
 25 % ĝis 20€
 20 % ekde 20€

Junulkurso 3a eldono kun komentoj franclingvaj	7,00
Kasedo de Junulkurso, internacie uzebla	7,00
Espéranto Éclair (Raymon Gueguen)	4,00
Cours Rationnel d'Espéranto, édition 2006, broché	10,00
Petite grammaire d'espéranto (Claude Gerlat)	6,00
Communication linguistique (Claude Piron)	5,00
Une humanité, une langue (Simone Glodeau)	2,30
La langue internationale (Raymond Gueguen)	8,00

Dictionnaire pratique (Fr-Eo / Eo-Fr) eldono 2000 formato 140 x 200, tole bindita	23,00
Dictionnaire de poche (Fr-Eo / Eo-Fr) reviziita eldono 2005 formato 105 x 150, 130 paĝoj	4,30
Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Gaston Waringhien), 3a, reviziita kaj plibonigita eldono, tole bindita.	23,00
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldono 2005 formato 155 x 245, bindita	80,00

A
B
C
D
E
F
G
H
I
J
K
L
M
N
O
P
Q
R
S
T
U
V
W
X
Y
Z

Une écriture fine.	Maldika skribo.
Cette femme a la taille fine.	Tiu virino havas sveltan talion.
Cet homme a les traits fins.	Tiu viro havas delikatajn trajtojn.
Un tissu fin.	Maldika teksaĵo.
Un stylo-feutre à pointe fine.	Feltokrajono kun maldika pinto.
Les plus fines nuances de la pensée.	La plej delikataj nuancoj de la penso.
Cet arbre se trouve au fin fond de la forêt.	Tiu arbo troviĝas en la fina fundo de la arbaro.
Le fin mot de l'histoire est enfin connu.	La ŝlosilo de la historio estas fine konata.

■ En kelkaj esprimoj la adjektivo **fin** rolas kiel substantivo aŭ kiel adverbo, plu elvokante iun signifon de la adjektivo. En la unua sekvanta frazo ĝi rolas kiel substantivo ; en la dua kiel adverbo.

C'est le fin du fin.	Tio estas plej delikata delikataĵo.
Elle est fin prête.	Ŝi estas tute preta.

■ Restas loko por mencii du homofonojn de **fin**, nome **faim** kaj **feint**. Jen ekzemploj de uzo de tiuj vortoj :

La faim est le meilleur assaisonnement.	Malsato plej bone gustigas la manĝon.
Ne pouvant l'empêcher, il feint de l'organiser.	Ne povante malebligi tion, li ŝajnigas, ke li organizas ĝin.

Andreo Andrio



Novaj ESPERANTO

En la franca suplemento de La Sago 56 ni prezentis kiel novaĵon tiun libron.



Temas pri bildstrio en la franca lingvo, tradukita de la Itala sed kiu bildigas mondon, kie ĉiuj supoze parolas esperanton...

Interesa posta ĉapitro klarigas la ideojn de la aŭtoro, interalie pri liaj rilatoj kun Esperanto...

Estus sufiĉe amuze, ke iam oni tradukos tiun verkon esperanten, tiel konsistigante postan originalaĵon ...

Nun ĝi estas diponebla en la libroservo, je la kutima publika prezo de 16 €

- aperigo : 22/10/2008
- aro : KSTR
- Serio : KSTR
- 144 p. 19 x 28 cm
- ISBN : 9782203003835
- EAN : 9782203003835

Nia kara amiko Pierre Salingue, membro de SAT-Amikaro kaj de Esperanto Thionville forpasis pro pulma embolio vendrede la 26an de februaro.

Li estis tre bonkora kaj afabla viro. Li tre ŝatis esperanton kaj volis instrui la komencantojn okaze de nia staĝo en Nilvange en aprilo. 80-jaraĝulo li havis multe da projektoj: partopreni E-kongresojn, vojaĝojn.

Bruno Henry

Statistiko pri senlaboreco kaj dungiteco: Kampo de politikaj manovroj (dua parto)

Konsidere la strangecon de la nombroj da senlaboruloj anoncigitaj de la registaro, suspektoj pri manipulado vekigis: la senlaboreco ŝajnis forte malprogresi, dum kreo de dungoj ne aperis. La kreskado de la nombro da elstrekoj fariĝis tro rimarkebla en la statistikoj de la Nacia Ofico por Dungiteco. Tiam la registaro vigligis sian komunikadon pri la mirakla malprogreso de la senlaboreco. Pere de nova artikolo aperinta la 10-an de januaro 2006 en la gazeto *Le Parisien*, ĝi aplombe akuzis la Nacian Instituton de Statistiko kaj Ekonomikaj Esploroj, ke ĉi tiu lasta subtaksis la kreon de dungoj. Laŭ tiu artikolo, kiu estis la voĉo de la registaro, la koncerna instituto ne estus plene eniginta en siajn statistikojn la nombrojn da novdungaj kontraktoj (franclingve *contrats nouvelles embauches - CNE*), kio respondus al pluraj miloj da dungoj. Apogante sian diron sur studaĵo farita de societo zorganta pri konsiloj al la malgrandaj entreprenoj, la ĉefministro *Dominique de Villepin* pretendis, ke la novdungaj kontraktoj ebligis krei 80.000 suplementajn dungojn en la daŭro de 5 monatoj. Fakte, la rezono de la ĉefministro baziĝis sur deklaroj pri intencoj dungi, kaj malatentis la rompojn de laborkontraktoj.

Fiera pri tiu «sukceso», la ĉefministro tiam lanĉis la unuadungajn kontraktojn (franclingve *contrats premières embauches - CPE*), kiuj estis kvazaŭaj novdungaj kontraktoj por la gejunuloj, sed en februaro 2006 grandegaj manifestacioj kontraŭ la unuadungaj kontraktoj estigis la finon de la ambicio de la ĉefministro *Dominique de Villepin* fariĝi prezidento de la respubliko. Samtempe kondamniĝis mastroj, kiuj maldungis salajrulojn sub novdunga kontrakto, sen motivi sian decidon. La Internacia Organizaĵo por Laboro (franclingve *Organisation internationale du travail - OIT*) juĝis la novdungajn kontraktojn kontraŭaj al sia 158-a konvencio, kiu specifikas, ke salajrulo ne povas esti maldungata sen valida kialo. Koncerne provperiodon, ĝia daŭro devas esti modera. Oni konsideris, ke la dujara tempodaŭro de la tielnomita «periodo de dungofirmigo» (franclingve *période de consolidation*) estas tro longa. Poste, la Internacia Buroo pri Laboro (franclingve *Bureau international du travail - BIT*) kaj la Kasacia Kortumo definitive kondamnis

la novdungajn kontraktojn.

En la somero 2006, la direktoro de la Nacia Unuiĝo por la Industria kaj Komerca Dungiteco konstatis, ke forestis 100.000 novdungaj kontraktintoj kompare kun la nombro da deklaroj pri intencoj dungi anoncigitaj ĝis tiam; ili rezignis publikigi tian rezulton.

Samtempe la registaro kaj la direktoro de la Nacia Ofico por Dungiteco daŭre manovris, por altigi la premon sur la nombrojn de la oficiala senlaboreco. Ekde januaro 2006, ĉiumonataj kunvokoj de la senlaboruloj anstataŭis ĉiusemestrajn reekzamenojn pri la situacio de la koncernatoj. Oficiale temis pri pli bona atento al la dungopetantoj kaj pri forigo de tiuj, kiuj senrajte enskribiĝis. La realo estis alia: - la interparoloj daŭris nur kelkajn minutojn aŭ okazis kolektive; - iafoje la rendezuoj estis telefone difinitaj. Tiu farmaniero havis la celon starigi iel surogaton de personecigita akompanado, kies ĉefa avantaĝo konsistis en akcelado de elstrekoj el listoj de senlaboruloj, ĉar pli oftaj kunvokoj respondas al pligrandigo de la probableco de nerespondoj al kunvokoj, des pli, ke leĝo permesas al senlaboruloj mallonge okupiĝi. Fakte, la risko de administraciaj elstrekoj, kiu de la jaro 2001 estis stabila en la proksimuma nombro de 1,4 procento, kreskis ĝis 1,7 en la komenco de la jaro 2006, kio respondis proksimume al 6.000 pliaj elstrekoj ĉiumonate koncernantaj nur la dungopetantojn de la kategorio «Plena senlimtempa dungiteco» Tiel, kiam la jaro 2006 finiĝis, la registaro de la ĉefministro *Dominique de Villepin* povis anonci malaltiĝon de la procento da senlaboruloj en la nombro de pli ol 1,5 en la daŭro de 18 monatoj; tio respondis al 400.000 personoj, dum la kreado de novaj dungoj ne estis sufiĉa, por klarigi tiun malaltiĝon. Kiam en januaro 2007 la Nacia Instituto de Statistiko kaj Ekonomikaj Esploroj prokrastis ĝis la aŭtuno la jaran revizion de la nombro da senlaboruloj, kiu devis okazi en la komenco de marto 2007, kelkajn semajnojn antaŭ la balotado pri la prezidenteco, tiam estiĝis duboj pri la sincereco de la koncerna nombrado. Perdiĝis la iluzioj pri la malgrandiĝo de la senlaboreco, sed la statistikoj pri tiu temo trudiĝis al la tiama elektokampanjo. Fakte, la nombro da senlaboruloj, kiun publikigis la Nacia Ofico por Dungiteco,

estis dubinda kompare kun tiu kalkulita de la Nacia Instituto de Statistiko kaj Ekonomikaj Esploroj pere de la enketaj demandoj pri dungiteco.

En marto 2007, la partoprenantoj en kunveno de la Nacia Konsilio de la Statistika Informado (franclingve *Conseil national de l'information statistique - CNIS*) alestis al kurioza teatra prezentado: de unu flanko la Nacia Instituto de Statistiko kaj Ekonomikaj Esploroj kongruigis teknikajn argumentojn nekomprenablajn por nefakuloj kaj kritikatajn de specialistoj; de la alia flanko la Direkcio por la Impulsado de Esplorado, Studado kaj Statistiko, kiu estis ŝarĝita per la statistikoj pri la dungopetantoj registritaj en la Nacia Ofico por Dungiteco, minimumigis la eblan efikon de la ŝanĝiĝoj en la administra maniero sur la statistikoj pri la senlaboreco.

La nura pozitiva punkto de la debato estis, ke la Nacia Instituto de Statistiko kaj Ekonomikaj Esploroj konigis la procenton da senlaboreco por la jaro 2006 laŭ la enketaj demandoj pri dungiteco: la senlaboruloj estis en la nombro de 9,8 procentoj, kio respondis al 0,7 plia procento kompare kun la taksadoj publikigitaj ĝis tiam. La meza nivelo de la senlaboreco dum la jaro 2006 estis la sama, kiel dum 2005.

Malgraŭ multaj publikaj debatoj kaj komplete esprimitaj admonoj aperintaj en konjunkturaj publikigaĵoj, la registaro fanfaronis pri la plej malalta procento de senlaboreco depost la jaro 1983. Dum ĉe multaj mediatoj oni nuancis tiun anoncon, el la ĵurnalo *Le Parisien* de la 30-a de marto 2007 gazetisto opiniis utila diri, ke «la lastaj nombroj da senlaboruloj estas favoraj antaŭ la unua el dufoja balotado pri la prezidenteco».

(daŭrigota)
Jean Selle

Noto.

La elementoj de tiu artikolo fontas el la enhavo de la 2-a ĉapitro de la libro titolita *Le grand truquage*, verkita de kolektivo da statistikistoj sub la pseŭdonimo *Lorraine Data*, eldonita de la firmao *La Découverte* en majo 2009.

La Ĝenerala Kanto

Pablo Neruda ricevis en 1971 la Nobel-premion; lia ĉefverko estas ampleksa poemaro, la *Canto General*, en la hispana lingvo, unue eldonita en 1950 en Meksikourbo.

Bonega traduko al la franca aperis en 1977; tiu de *Claude Couffon*, ĉe Gallimard. Esperantigis kelkajn poemojn Georges Lagrange. Freŝdate Michel Duc Goninaz tradukis «La Liberigantojn».

En Hillion, la 4-an de aprilo, korusanoj de Interkant' kantos ses muzikaĵojn en esperanto post parola prezentado.

Pablo Neruda (1904-1973)

Dum la sama jaro 1904, naskiĝas Pablo Neruda en Ĉilio kaj mortas lia patrino. Studento en Santiago, li jam verkas poemojn, eĉ ĉiutage. Dum sia vivo, li multe vojaĝis, ĉar li estis konsulo en pluraj landoj. Inter aliaj, sinsekve en Cejlono (nuna Srilanko) en 1928, en Javo, en Singapuro, en Bonaero, Barcelono, Madrido (1936).

Lia patro forpasis en Temuco, la ĉefa urbo de la Mapuĉoj, tiuj Indianoj, kiujn la hispanaj konkerintoj nomis Araŭkanoj. La saman vesperon Neruda ekverkas sian *Canto General*.

Ekde 1947 la politikaj tumultoj disvolviĝas en Ĉilio. Parenteze la enlanda milito eksplodas en Grekio la saman jaron; tiel Neruda kaj Theodorakis spertis samtempajn aŭ similajn travivaĵojn.

En 1946, Gonzalez Videla elektiĝas prezidanto de Ĉilio kun subteno de la komunistoj; sed la postan jaron, li ekatakas siajn apogintojn. Neruda protestas en la senatejo; Videla ordonas lian enkarcerigon. Sed Neruda kaŝas sin ĉe aktivuloj en Ĉilio, ĉe kiuj li finskribas sian Ĝeneralan Kanton.

En 1949, li ĉevale trarajdas la andan kordileron kun la manuskripto de *Canto General* kaj unu aŭ du boteloj da vino. En 1950, li eldonas sian ĉefverkon en Meksikourbo. En 1952 finiĝas la diktaturo en Ĉilio, kien li revenas.

En 1969 li intencas kandidatiĝi en la prezidanta baloto de Ĉilio, sed preferas lasi Allende, kiu elektiĝas. Sed la 11-an de septembro 1973, la puĉo de Pinochet alportas diktaturon.

La liberigantoj

(komenco)

Jen ĝi estas, la arbo, la arbo
de la tempesto, la arbo popola.
El la ter' alsupras herooj,
kiel folioj per la suko,
kaj la vento rompas la foliojn
de la rumora homamaso,
ĝis ree falas la semo
de l' pan' fine en la tersulkon.

Jen ĝi estas, la arbo, la arbo,
nutrata per nudaj kadavroj,
korpaj vipaditaj, kripligitaj,
korpaj kun trajtoj monstrigitaj,
sub la pint' de lanco palisuma,

Tuj poste la du (aŭ tri) domoj de Neruda estas prirabitaj. Neruda mortas pro malsano la 23-an de septembro, en Santiago.

Tiuj kelkaj eventoj el la vivo de Neruda fontas el la libro de Claude Couffon: *Pablo Neruda, Chant Général; traduction, glossaire et chronologie*, Gallimard, 1977, 562 paĝoj.

La amerikaj indianoj

Belege ilustrita libro priskribas la diversajn popolojn, kiuj vivis en Ameriko antaŭ la alveno de Kolumbo en 1492: *Amériques, les héritiers des dieux*, Alain Chenevière, Nathan images, Parizo, 1988.

La aŭtoro memorigas al ni la libron de Bartolomé de Las Casas pri la detruado de la Indianoj; tiu dominikano publike diskonigis la kruelecon de la konkerintoj. La historiistoj ne konsentas pri la procento de malkresko de la loĝantaro dum la 16-a jarcento. Ĉu proksimume 65 %?

Ne nur la amasbuĉadoj respondecas, sed plie la epidemioj, ĉar la hispanoj transdonis variolon, morbilon, gripo, tifon kaj tiel plu... Ankaŭ kontribuis la translokiĝoj de la indianoj al regionoj kun malsama klimato.

La araŭkanoj, aŭ mapuĉoj, estis militemaj; ili rezistis kontraŭ la konkerantoj. Sed poste alvenis germanaj koloniantoj, kiuj kreis ampleksajn bienojn. La mapuĉoj ribelis je la fino de la 19-a jarcento. La ĉilia ŝtato enfermis ilin en malgrandaj rezervejoj. Nuntempe 300.000 mapuĉoj estas ensorbitaj de la ĉilia socio. Hodiaŭ restas ankoraŭ kelkaj el ili en karcero. Tiel malaperas tiu popolo, kiu loĝis sur la

pulvorigitaj sur la ŝtiparo,
senkapigitaj per hakilo,
dismembrigitaj per ĉevalo
aŭ krucumitaj en preĝejo.

Jen ĝi estas la arbo, la arbo,
kies radikoj estas vivaj.
De martirad' ĉerpinte sterkon,
la radikoj nutris sin sange.
El la grundo ĝi larmojn eltiris,
kaj ĉerpis per sia branĉaro,
arkitekturon sian formante.
Estis floroj nevideblaj fojfoje
floroj en la tero,
alifoje brilas petalar'
sub la arba lum' kvazaŭ planedoj.
Kaj la homo en la branĉoj kolektis

Andoj, duone en la nuna Ĉilio, duone en Argentino.

Mikis Theodorakis (1925 -)

Tiu fama komponisto estis ankaŭ politikisto. Li naskiĝis sur la insulo Ĥio en Grekio. La patro devenas de Kreto; la patrino de Anatolio. Rezistanto dum la dua mondmilito, li estis arestita kaj torturita. Dum la greka enlanda milito (1946-1949), arestita kaj deportita sur dezertecajn insulojn.

Poste li restadas en Parizo kaj studas en la konservatorio. Elektita parlamentano en Grekio, li kreas ducent kulturajn centrojn. Dum la diktaturo de la koloneloj (1967-74) li estis arestita, deportita kaj fine ekzilita. Duan fojon li restadas en Parizo. Tie li renkontos Nerudan. Ili iĝas amikoj.

En 1972, Allende invitas lin al Ĉilio kaj petas, ke li muzikigu plurajn poemojn de la Ĝenerala Kanto. Li iĝas fama pro tio, kaj ankaŭ pro la *Axion Esti* kaj filmaj muzikaĵoj: Z en 1963, Zorba en 1964.

Mi eksciis en la kinoteko de Tuluzo, ke li verkis dudekon da filmomuzikaĵoj. Plejpartaj temoj estas la luktoj en Grekio kontraŭ la nazioj, la koloneloj, kaj la eventoj en Kipro ĉirkaŭ 1974.

Mi nur citas unu filmon: *La homo kun la dianto*, 1980; ĝi priskribas la arestadon, juĝon kaj ekzekutadon de maldekstrega batalanto en la unuaj 1950-aj jaroj. Li kritikis la ekspluatadon de Grekio far la eksterlandanoj; Grekio iĝis sub usona influo, post la britia. La simileco kun la muzikaĵo *La frukta kompanio* estas okulfrapa.

J. Caubel

la korolojn malmoliĝintajn,
por la transdon' de mano al mano,
kiel granatoj, magnolioj,
kaj subite jen malfermiĝ' de l' tero
kaj la kreskiĝo ĝis la stelaro.

Jen ĝi estas arbo de l' libero,
la arbo-tero, la arbo-nubo,
la arbo-pan', la arbo-sago,
la arbo-pugno, la arbo-fajro.
Ĝin sufokas la akvo tempestoza
de nia tempo de mallumo.
Sed ĝia masto rulbalancas
l' arenon de sia potenco.

trad. Michel DucGoninaz

Esperantistoj aktivas

KUNVENO SAT-AMIKARO

en Bretonio

la 12an de decembro 2009
en Vannes

PROTOKOLO

Ĉeestis 18:

Marielle Giraud, Manjo Clopeau, Laura Lablanquie, Davy Chesneau, Denis Serge Clopeau, Erika Lohée, Jean Le Dorh, Nicole Hansen, Pierre Jaffré, Francis Desmares, Ewa Scourzic, Jacqueline Ahier, Michel Krassik, Jean



Yves kaj Maryvonne Santerre, Franjo Leveque, Jean Hervé Jaouen, Guy Martin.

Naskiĝo

La 12an de decembro 2009, en Arta Palaco de Vannes, dum 3 horoj, 18 bretonaj kuraĝuloj frontis malvarmon por konatiĝi, pliscii pri SAT-Amikaro, SAT kaj debati pri diversaj interesajoj.

Kiel foraj gekuzoj, ni unue esperante konatiĝis; bonŝance ne temis pri morto sed tute male pri naskiĝo de nova neformala bretona grupo pri SAT-Amikaro.

Unue, iu diris kiel malfacilas scii, kiuj estas SAT-amikaranoj kaj renkonti ilin en Bretonio.

Poste, pro ĉeesto de novaj esperantistoj, la kunveno okazis franclingve.

SAT kaj SAT-Amikaro

Ni profitis ĉeeston de Franjo kaj Jean Yves Santerre. Franjo, kiel komitatano, klarigis historieton de SAT (Sennacieca asocio tutmonda : <http://www.satesperanto.org/>) kaj nunan agadon pri klerigo ĉefe per ties revuo, retejo

kaj kongreso (la venonta okazos de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto 2010 en Braŝovo

– Rumanio <http://satesperanto.org/Bazaj-praktikaj-informoj,1537.html>).

Jean Yves, zorgas ekde 1997, post Bernard Schneider, pri sendado de libroj kaj metodoj por lerni kaj uzi Esperanton al kluboj kaj anoj ĉefe en Afrikon.

Guy prezentis la asocion SAT-Amikaro kaj informis pri venonta kongreso kiu okazos de la 3a ĝis la 6a de aprilo 2010 en Hiliono apud *St Brieuc* : <http://www.esperanto-sat.info/rubrique130.html>).

SAT-Amikaro kaj Espéranto-France

Krom pliscii pri niaj SAT kaj SAT-Amikaro, grava demando estis : Kial la 2 asocioj Espéranto-France kaj SAT-Amikaro

Denis Serge precizigis multajn interesajn historiajn aferojn kaj respondis al tiklaj demandoj (partopreno de Esperanto en UNESCO, evoluo de UEA post la 2a mondmilito kaj post 1980 al lingva rajto, lingva diverseco). Li parolis pri malnova kverelo inter la du asocioj, kiu okazis tuj post la 2a mondmilito, sed kiu restas en memoro de kelkaj asocioj.

Kiam Espéranto-france kaj UEA defendas ideon pri diskonigo de Esperanto, SAT-Amikaro devus insisti pri la klerigaj celoj de SAT por diskonigi popularan, senpagan scion pere de Esperanto.

Iu demandis kiel SAT-Amikaro rilatas kun sindikatoj kaj insistis pri tiuj rilatoj kun laboristoj, ne nur papere.

Aliaj temoj

Jean Hervé Jaouen parolis pri sia pordeto, kiun li kreis kaj ĝisdatigas: <http://www.esperanto-tra-la-mondo.net/>.

Davy Chesneau parolis pri socia forumo, kiu okazos la 30-31an de januaro 2011 en Séné apud Vannes kaj proponis ke iu starigu budon pri Esperanto. Bedaŭrinde, neniu povis ĉi tiun jaron.

Konkludo

Konklude, ĉiu partoprenanto prezentis sin kaj multaj partoprenis per demandoj kaj rebatoj; pluraj diris ke ili ĝojis konatiĝi kaj tiele interŝanĝi pri la asocioj.

Mi proponis ke SAT-Amikaro sendu sian revuon dum 3 monatoj al la partoprenintoj, kiuj ne ricevas ĝin.

Venonta kunveno okazos en Hiliono,

ankoraŭ ekzistas ? Ĉu ili kune agadas ? Kiujn malsamajn celojn ili trafas ?

Iu diris ke bazaj membroj ne komprenas



kial la du asocioj ne kune kongresas, ne havas samlokan oficejon aŭ komunan libroservon.

Ni precizigis ke post la komuna renkontiĝo en Bulonjo/maro en 2005, Espéranto-France kaj SAT-Amikaro samloke kongresos en aprilo 2011 en Sète.

en la kongreso de SAT-Amikaro kaj poste ĉiusesmonate, en iu alia bretona departemento.

Malgraŭ la tre seriozaj temoj, kiujn ni interŝanĝis, la etoso restis simpatia eĉ ridega.

Protokolis: Guy

LaSag-butikumu!

EldonaFakoKooperaTiva de SAT

<http://www.satesperanto.org/eldonkooperalivo/>

El la katalogo: (haveblaj ĉe la libroservo de SAT-Amikaro)

- 10 Glumarkoj : 1€ (100 : 7€)
- Pingloinsigno : 1,5€
- T-ĉemizo : 10€

Novaj!

